FN PERANC 47

# ESPERANTO NORMANDA BULTENO

.unuiĝo de la normandaj esperantistoj

n°160 TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL. de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE.

FEBRUARO 1988A

*****************************************************************

V I N T R O 1 9 8 7 A. - ( N° 75A NOVA SERIO )

## KARAJ AMIKOJ !

Vi legos ĉi-sube la nomon de tiuj inter ni kiuj sukcese trapasis la ekzamenon "Atesto pri Lernado".

En tiu bulteno, la anoncoj pri GRESILLON kaj KCE proponas tre interesajn rendevuojn por eklerni aŭ plibonigi la lingvo-nivelon. Jen indaj celoj por viaj venontaj ferioj !

Kompreneble, la Normanda Rendevuo okazonta en ROUEN la 12an kaj 13an de Marto, estos ankaŭ bona okazo por intimiĝi kun nia verda kulturo. Verda kulturo en verda regiono, bela programo !!!..

:-:-:-:-:-:

FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO
INSTITUT FRANCAIS D'ESPERANTO — JARO 1986/1987

NORMANDA FEDERACIO

LISTO DE LA SUKCESINTOJ

ATESTO PRI LERNADO :
- BESSIERE Albert (TB)
- CONTE Marie-Thérèse (B)
- LERICHE Gaëlle (SB)
- LERICHE Yann (B)
- LEROY Dominique (SB)
- MUNDO Marie-José

Sincerajn gratulojn al la sukcesintoj. Ili daŭrigu sian studadon por akiri la A. pri Praktika Lernado. Tre mankas sukcesintoj en tiu kategorio kaj en la pli alt-nivelaj ! Ĉu ne sufiĉas kursgvidantoj en Normandio ?

La Direktorino de la Ekzamencentro : J. VINCENT.

# NIA VIVO...

**. YVETOT** La kurso por komencantoj, kiu komenciĝis dum Septembro kun 4 lernantoj en Junuldomo, tute kontentige progresas. Dum sia Ĝenerala Kunveno okazinta en Decembro, la grupo decidis restar-igi la monatajn kunvenojn ek de Februaro 1988, la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato. La unua el tiuj kunvenoj okazis la 4an de Februaro ĉe Ges-oj Pottier. La sekvontaj okazos laŭvice ĉe ĉiuj grupanoj.

La 29an de Novembro, la grupo celebris la 100 jarojn de Esperanto per komuna tagmanĝo en Résidence Jacques Lefebvre. 24 personoj ĉeestis tiun manifestacion, inter kiuj troviĝis S-ino Bosc, edzino de la tre bedaŭrata prezidinto de U. N. E., S-ro Marcel Bosc.

Komuna tagmanĝo : La Ĝeneral Kunveno ankaŭ decidis anstataŭigi la tradician Reĝkukan Feston per komuna tagmanĝo okazonta en :


Foyer Saint-Exupéry
17, rue Ferdinand Lechevallier

la DIMANĈON 24an de Aprilo, je la 12a Horo

Krom la grupanoj, ĉiuj aliaj esperantistoj estos bonvenaj. Ĉiuj personoj interesataj, bonvolu sendi sian aliĝon al :



S-ro Pierre Pottier
25, allée des Roitelets
76 190 Yvetot



Prezo de la manĝo : 75 frankoj.
Bonvolu preferinde pagi per ĉeko al :

"Centre Culturel Esperanto d'Yvetot"
C. C. P. Rouen 1284 - 35 G

Nepre sendu la aliĝilon antaŭ la fino de Marto.

Antaŭan Dankon.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

## Gravaj Eventoj Ĉe Ni

**. ROUEN**

La 80a franca Kongreso de Esperanto okazos en Rouen dum Pentekosto de la 20a ĝis la 24a de MAJO. U. F. E. elektis la muzean urbon pro kongresi. Nia normanda unuiĝo kaj la ruena grupo ĝojas pro tiu evento. Estus deziriNde ke plej multaj normandoj ĝin ĉeestu. Kutime, la normandoj estas tre malmultaj ĉe la naciaj kongresoj. En 1988 la ekskuzo pro malproksimeco ne valoras !
Petu aliĝilojn ĉe U. F. E..

...

La Rùena grupo organizas la unuan Normandan Rendevuon de Esperanto. Ĝi okazos la 12an kaj 13an de Marto. La programo estas alloga kun diversnivelaj kursoj, ekzamenoj, prelegoj de Giorgo Silfer pri esperantologio, de Perla Martinelli pri la humuro de Julio Baghy. Ankaŭ diskutoj kaj teatra vespero kun TESPA.

Ni esperas ke multaj normandoj deziros partopreni tiun kulturan semajnofinon.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

**.CAEN** S-ro Angenault daŭre gvidas kurson en Caen. Ĉi-jare li instruas per Cseh metodo al 5 komencantoj kiuj vigle partoprenas la kurson.

Alia kurso okazas por la progresantoj kaj ĝenerala kunveno kunigas ĉiujn ĉiumonate.

**.HEROUVILLE** 6 personoj ĉeestas kurson en interna etoso ĉar inter ili estas Anglo. Baldaŭ alvenos sepa lernanto, studento en la Universitato.

Bona etoso dum tiuj rendevuoj. Ni legas la bildstrion "Tinĉjo : La Krabo kun oraj pinĉiloj", ne tedigan libron kiu ebligas la studon de diversaj gramatikaj punktoj, kaj liberan konversacion.

La motivoj de la lernantoj ne mankas, sed laboro, agado en aliaj asocioj, kilometroj, ktp, bedaŭrinde starigas gravan obstaklon kontraŭ regula kurso.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

## REZOLUCIO

Laŭ peto de S-ro Blactot en Le Havre, la membroj de la Ĝenerala Kunveno en Houlgate voĉdonis rezolucion en kiu ili petis ke ĉiuj Francaj Esperanto-organizoj kreu komunan komitaton kaj kunlaboru kun la similaj eksterlandaj asocioj por batali por ke Esperanto ludu oficiale en Eŭropo sian rolon de helplingvo , kaj ke internacia petskribo estu organizata por peti tion.

Tiu rezolucio estis sendita al U. F. E., SAT-Amikaro F. E. T., F. K. E. A. kaj Fervojista Asocio, kun kopio al U. E. A..

Ĝis nun, nur U. F. E., SAT-Amikaro kaj U. E. A. respondis. La du unuaj diris, ke tio postulus multe pli da fortoj kaj mono, ol ili posedas, kaj U. E. A. deklaris, ke se tia agado okazos ĝi preferinde estu organizata rekte inter la Eŭropaj asocioj.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

REDAKTAS : Yves NICOLAS, 17-37 Quartier du Bois
14 200 HEROUVILLE Tel. : 31-95-11-81

ELDONAS : UNION des ESPERANTISTES DE NORMANDIE

KOTIZO - ABONO : Por la jaro 1988 : 45 F.
C. C. P. nº 283 40 H ROUEN

## .LE HAVRE

La Ĝenerala Kunveno okazis la 24an de Oktobro 1987. La protokolo pri tiu jubilea jaro havis esceptan longon por rakonti, la raportoj jam aperis en antaŭaj numeroj de N. E. B.. Diversaj artikoloj aperis en la regiona gazetaro : ekster la artilolo pri la Kongreso en Varsovio, estis prezentita artikolo kun fotoj en rilato kun la kurso por emerituloj, kaj aliaj pro la manifesto ĉe strato Zamenhof, kaj posta renkontiĝo. Pri la kurso, sub aŭspicio de la urba servo por emerituloj, ĝi disvolviĝas kontentige, kaj la gelernantoj ek-korespond-as kun emerituloj el Berlino. Aliaj por-esperantaj artilolój aperis en pluraj fakaj bultenoj, note en "La Tribune Ecologiste", tie dank'al la Naturamika sekcio en Le Havre. La nova unujara komitato de la grupo estis reelektita unuanime, kaj tuj prezentis novajn projektojn.

La 27an de Novembro, korespondantoj de A. Chalm, el Germanio Ges-oj Davi Köning, vizitis nian urbon dum tri tagoj. Ili estis gastoj de kelkaj membroj, kaj partoprenis en komuna manĝo kun la grupanoj. Tiam okazis granda surprizo : atingis nin S-ro Gao Xi-iju, vic-prezidanto de la Grupo en Dalian troviĝis en Le Havre por kelkaj tagoj. Ni havis la bonŝancon ke li povis kunmanĝi kun ni, kaj poste, kunveneto de kelkaj grupanoj permesis rapidan rapidan diskuton pri la rilatoj inter niaj du grupoj. Notinde ke kelkaj membroj de la grupo korespondas kun esperantistoj de Dalian (ĉina urbo ĝemelita kun la urbo Le Havre).

La antaŭplanita ekspozicio en "Parc de Rouelles" ne povis okazi : nun, estas en preparo alia ekspozicio en la Universitato.

Monataj Kunvenoj : Jen la programo de la paroladetoj por la lern-sezono 1987/1988 :



- Novembro : "Varsovio"
- Decembro : "Pollando"
- Januaro : "La Normandi-ponto"
- Marto : "La Ciganoj"
- Aprilo : "Vojaĝrimedoj"
- Majo : "Niaj infanludoj"
- Junio : "Mia vojaĝo al Usono"

Pro la malkomforto de la ejo dum la vintra sezono, la monataj kunvenoj okazos en salono 56 strato A. France, dum la vintra sezono.

Naŭ havranoj ĉeestis la kunmanĝon en Yvetot, la 29an de Novembro ; ja, estas agrable retrovi malnovajn amikojn, kaj ankaŭ konstati ke novaj esperantistoj sopiras al tiaj renkontiĝoj.



Le Havre.

**groupe esperanto region rouennaise**

ANNIE GAILLARD
4 RUE LOUIS JOUVET
76800 ST ETIENNE DU ROUVRAY.
T. : 35.65.10.11.

C.C.P. ROUEN : 2770.32.A.

# ESPERANTO RUENA REGIONO

association culturelle (loi 1901).

7

## GENERALA KUNVENO :

SABATON LA 16AN DE JANUARO 88A, OKAZIS LA ĜENERALA KUNVENO DE NIA LOKA GRUPO EN LA JUNULDOMO DE ROUEN

La ĉeestantaro unuanime aprobis la diversajn rapor-tojn, prezentitaj fare de la prezidanto kaj de la kasisto.

En nia asocia kaso estis la 4an de januaro 88a : 3.865,39 F. kaj 45 personoj pagis jaran kotizon al la loka grupo por 1987.

La ĝenerala kunveno voĉdonis por la ĉi-jara kotizo : (same kiel lastjare) :

Por 1988 : Simpatianto : 40,00 F. - Membro : 40,00 F.
Subtenanta membro : ek de 60,00 F.

Bonvolu sendi viajn kotizojn al nia kasisto : Pierre QUILLAUD 16 rue du Lieutenant de Vaisseau Paris. 76120 GRAND QUEVILLY. Nome de "Groupe Esperanto Région Rouennaise" C.C.P. ROUEN 2770.32.A. Antaŭdankojn !

## ASOCIA ESTRARO :

Nova skipo gvidas nian lokan asocion . Jen la rezul-tatoj de la voĉdonado.

- HONORPREZIDANTO : SINJORO EDGARD JOUIS. (BOISGUILLAUME).
- PREZIDANTINO : ANNIE GAILLARD.(ST ETIENNE DU ROUVRAY)
- SEKRETARIINO : GUNNEL POULAIN.(BOSC RÉGNOULT EN ROUMOIS)
- KASISTO : PIERRE QUILLAUD. (GRAND QUEVILLY)
- -HELPSEKRETARIO : DOMINIQUE LEROY. (BIHOREL)
- HELPKASISTO : ALBERT BESSIERE. (ROUEN)
- KONTREVIZIISTO : PIERRE JOUVIN. (GRAND QUEVILLY).

Ek de nun vi bonvolu noti la novan asocian adreson ĉe la prezidantino.

ANNIE GAILLARD 4 RUE LOUIS JOUVET 76800 SAINT ETIENNE DU ROUVRAY.
TEL. : 35.65.10.11.

## KURSOJ : STAĜOJ :

ĉiam gvidataj de Petro QUILLAUD en Grand Quevilly.

- d° - de Jacqueline LHERMITTE en la M.J.C. ROUEN + kursoj en Paris ST Lazare SNCF + perkoresponda kurso de la Fervojista Asocio + ŝi zorgas ĉi-jare pri la Internacia kongreso de la Fervojista Esperanto Federacio : I.F.E.F. en PERPIGNAN (4a -11a de junio 88) Vojaĝemulino !

- d° - de Pascal DUBOURG dum restadoj en la Kultura centro de LA CHAUX de FONDS Svisio ! Li ankaŭ estas la delegito por Normandio de la gejunuloj de J.EF.O. Notu lian adreson : P. DUBOURG, 3 rue Georges Chédanne 76150 Maromme La Maine. Tel.: 35.75.87.66.
Ankoraŭ estas li, kune kun KOOPERATIVO de LITERATURA FOIRO, kiu organizas la unuan Normandan Kunvenon la 12 -13an de MARTO. en Rouen.

GRATULOJN ! Ni ĝojas sciigi al vi, ke nia estrarana amiko ALBERT BESSIERE el Rouen ĵus estis dekoraciita kiel "Officier dans l'ORDRE NATIONAL du MERITE" Varmajn gratulojn al li !

**groupe esperanto region rouennaise**

ESTRARA KUNVENO : La venonta kunveno de la asocia estraro okazos :

VENDREDON LA 4AN DE MARTO 88A JE LA 20H00 en la M.J.C. ROUEN Rive Gauche 114 avenue de Bretagne.

Tagordo : Fina organizado por la 1a Normanda Renkontiĝo la 12-13an de marto.

Nepra partopreno necesas ! Venu kaj partoprenu.

# STAĜOJ . BOURESSE.

TARIFO 1988. VALIDA POR ĈIU STAĜO.

ALIĜO 100 F.
TRANOKTADO DUM LA TUTA STAĜO : 120 F.
ĈIU TAGMANĜO EN LA VILAĜA RESTORACIO : 45 F.
ĈIU VESPERMANĜO EN LA STAĜEJO : 25 F.
ĈIU MATENMANĜO EN LA STAĜEJO : 16 F.
ĈIU DATO INDIKAS LA UNUAN TAGON DE LA STAĜO, DO LA PARTOPRENONTOJ ALVENOS LA ANTAŬAN TAGON.


| | |
|---|---|
| JULIO<br>4A-9A | PREPARO AL LA SKRIBA PARTO DE PEDAGOGIA ATESTO KAJ ALTAJ STUDOJ. |
| 11A-16A | HISTORIO DE LA ESPERANTO KOMUNUMO : PREPARADO AL LA PAROLA PARTO DE PEDAGOGIA ATESTO KAJ ALTAJ STUDOJ. |
| 18A-23A | MUZIKO, KANTO, TRADUKO DE KANTOJ : GVIDOS CLAUDE PIRON, LUCIE BOUROT-RAYNAL, GE-SOJ MACKAY. |
| AŬGUSTO<br>2A-7A | INFANKULTURO DE LA "DENASKAJ" ESPERANTISTOJ. "*K O N F I R M O T A*" |
| 9A-13A | INFORMADO PRI ESPERANTO. GVIDOS : MARCO PICASSO, GIORGIO SILFER. |
| SEPTEMBRO<br>9A-13A | STUD-, TURISM-, RIPOZSTAĜO. |

LA ALIĜO ESTOS SKRIBE KONFIRMATA DE SOCIETO YVONNE MARTINOT.

ĈIUJ PLIAJ INFORMOJ KAJ ALIĜOJ AL :
SUZANNE BOUROT
ROUTE DE CIVAUX
86410 BOURESSE.

## La Migranto

riĉe ilustrita revuo pri turismo, naturbelaĵoj, flaŭro kaj faŭno, ekologio, naturprotektado kaj kulturaj aferoj, estas eldonata de la Esperanto-Fako de Turista Asocio „La Naturamikoj" (TANEF). Ĝi aperas kvaronjare kaj kostas nur 7.00 fr. sv. Petu senpagan provekz-eron de : Liesel Nagel, Roseggerstr. 17, D - 7800 Freiburg, F.R. Germanio.



## KULTURA ESPERANTO-DOMO

### Kastelo „Grésillon"

**F-49150 BAUGÉ, Francujo.**

La K.E.D. akceptas, de mezo de junio ĝis la fino deaŭgusto,ĉiulandajn esperantistojn, kaj karavanojn frue anoncitajn en aprilo, majo, junio kaj septembro.
La Kastelo estas malferma de la 15-a de junio ĝis la 1-a de septembro. Kvin studperiodoj jam estas aranĝitaj kun interesaj programoj.

### VENU AL LA KULTURA ESPERANTO-DOMO

Bela, komforta kastelo; milda klimato; famkonata turisma regiono de Loire-kasteloj, kultureca kaj amikeca rondo; jen ĉio por vi en nia ferirestejo. La urbo Baugé estas atingebla per fervojo el Parizo en 4 horoj. Antaŭa enskribiĝo por restadoj nepre necesa, oni konfirmu alvenon kelkajn tagojn antaŭe.

**PETU LA PROGRAMON POR 1988**

Informpeto sendota kun internacia respondkupono al:

**Kultura Esperanto-Domo, Grésillon,**
**F-49150 Baugé, Francujo.**
**☎ okt-junio:(40) 76 77 95; julio-okt: (41) 89 10 34**



## KULTURA ESPERANTO DOMO

Grésillon
F-49150 BAUGÉ

La "Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj" estas kooperativa societo fondita en 1951. Ĝi posedas la bienon "Grésillon" kun kastelo kaj 17-hektara parko. Ĉiujare ĝi organizas:

- kursojn diversgradajn,
- prelegojn diverstemajn,
- distraĵojn diversspecajn,
- ekskursojn en belega regiono.


### KULTURAJ ARANĜOJ 1988

| | |
|---|---|
| **3/4 - 9/4:** | **Instrumetodoj** |
| | **Internacia Renkonto de Infanoj** |
| **14/6 - 29/6:** | **Internacia Amika Renkonto** |
| **2/7 - 15/7:** | **Cseh-seminario "A"** |
| | **Prelegoj kaj kursoj** |
| **16/7 - 29/7:** | **Lernu kaj Praktiku** |
| **30/7 - 5/8:** | **Ĉu verki Valane? sub gvido de Claude Piron** |
| **6/8 - 29/8:** | **Somera Lernejo** |

Detala programo aperos en novembro. Jam rezervu datojn. Skribu al: Esperanto-Domo, Grésillon 49150 - Baugé - Francio

## GRAY/SAONE

**MALNOVA KAJ TRE GASTAMA URBETO**




## NACIA ESPERANTO-MUZEO

**F-70100 GRAY**

**ATENDAS VIAJN HELPON KAJ VIZITON**


En 10 salonoj (230m²), de iama mezlernejo, naskiĝis ĉi tiu MUZEO, samtempe publika arkivejo, dokumentejo kaj konstanta ekspozicio de Esperanto.

Oni vigle kunhelpos per:

- kontribuo per donacoj (materialo kaj mono);
- daŭra sendado de ĉiuj novaj eldonaĵoj.

Adreso de la Muzeo: 19, str. V. Hugo, F-70100 Gray.
☎ 84 65 16 87

**INFORMAS LA KURATORO:**
**S-RO GEO. JUNIER, UEA-DELEGITO EN GRAY**
**☎ 84 65 11 73**



## Internacia Esperanto-Kursejo

organizas altnivelajn kursojn, fakajn seminariojn, simpoziojn, diversspecajn Esperanto-aranĝojn. Ĝi estas konstruita en la pitoreska Rodopi-montaro kaj ne ĝi estas sezona domo; tie okazas kursoj dum la tuta jaro.
IEK ne estas nur kursejo – ĝi estas ankaŭ feriejo situanta pli ol 1000m super la marnivelo, alloga dum ĉiuj sezonoj de la jaro.
En la kursejo oni studas 4 horojn matene, kaj posttagmeze estas organizitaj sportaj ludoj, prelegoj, projekciado de diafilmoj kaj ekskursoj al la urbo Smoljan kun planedarejo, al Pamporovo kaj al la etnografia rezervejo Mogilica.
**Informoj: Bulgara Esperanto-Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia, Bulgarujo kaj INTERNACIA ESPERANTO KURSEJO str. "Pozitano" 40 1000 Sofio.**

## La kasisto dankas...


La Kasisto dankas la membrojn kiuj pagis sian kotizabonon post alvoko en nia lasta bulteno.

Kelkaj ofendiĝis pro la enmetita alvokpapero kiu aspektis tro seka. Ili bonvolu pardoni la kasiston kiu konscias pri la malvarmeco de la teksto.

Kelkaj Rhenanoj ankaŭ konfuzis la kotizon por la regiona unuiĝo kaj la kotizon por la loka grupo.

:-:-:-:-:-:

## Deziras korespondi ...




- Ágnes SZERENCSÉS (19 jara)

  Eger, Rácóczi ut
  52 5/15
  3300 HUNGARIO

- Anna KACZOR (23 jara)

  BRZOSTKÓW 166
  28-135 BLOTNOWOLA
  wuj kickechie
  POLLANDO

  Pri religio

- Lidia DROGOS (18 jara)

  67-120 Koźuchów
  ul. 22 Lipca 28c/43
  wuj Ziclonogónskie
  POLLANDO

  Pri modo, filmarto, vojaĝoj, kolektado de poŝkartoj

:-:-:-:-:-:

*ESPERANTO* ★

IFEF - FISAIC
40a Internacia Fervojista Esperanto - Kongreso
PERPIGNAN
4a-11a de junio 1988

AFCE (Association Française des Cheminots pour l'Espéranto) invitas vin partopreni en la 40-a kongreso de IFEF (internacia Fervojista Esperanto Federacio), de la 4a ĝis la 10a de Junio 1988, en la suna Perpignan.

Informoj ĉe Pierre ROBIOLLE 18, Impasse Jamot 50 250 LA HAYE DU PUITS
kaj ĉe A. F. C. E. : 1bis, Rue d'Athènes 75 009 PARIS

# POEZIO

La itala movado por la vivo, tiujare en Savigliano (Nord-Italio) premiis poeziojn en la itala kaj esperanta lingvoj. Tiu movado emfazas "antaŭ ĉio la vivon, en spirito de dialogo, ĉar certe en la homa digneco kuŝas la ĉefa pasejo inter kredantoj kaj ne-kredantoj".

El la esperantistaj verkoj premiitaj en 1987, ni donas ĉi-sube la verkon de la 10 jara Cardone Emiliana. Por ŝi, milito estas sufero, stultaĵo, ĝi alportas nur malesperon. Tial leviĝas la pacokrio de tiu ĉi juna poetino, kiu, per la simpla pureco de ŝia animo, invitas nin al paco, se ni amas la vivon.

"Estas nokto
iuj dormas.
iuj militas.
Infanoj ploras,
Kvinjara knabo
havas pafilon :

Li devas pafi
Al malamiko
Sed li ne volas.
Li volas panon
Ĉar li malsatas.
Li volas pacon
Ĉar li amas la vivon.

(informas nin Albert Bessiere - Rouen)

---

§!&%/:¤¨?,;.3"'(-_)§!°)&_-('"¨^%+=/:.;?,§!°)&_6('"¨^%+=/:.;?,§!°)&_-('

(jen ĉi-supre nova internacia lingvo, ĉu preferinde lerni Eon?-ah!ah-)

---

Kultura Esperanto-Domo
Grésillon
F - 49150 Baugé

3/9 de Aprilo 88

INSTRUMETODO, PRAKTIKAJ KONSILOJ

Gvidos :

S-ino Childs-Mee
S-ro Dennis Keefe

- Prezento de diversaj metodoj
- Prezento de diversaj lernolibroj
- Debatoj, ĉeesto en kursoj

2/16 de Julio 88

CSEH-SEMINARIO "A"

La Internacia Esperanto-Instituto, kultura sendependa fondaĵo, pro konstanta intereso pri la Cseh-metoda instruado, organizas 3 gradajn Cseh-Seminariojn. En julio 1988 okazos Seminario "A" en Grésillon.

Ĝin rajtas partopreni ĉiu esperantisto kiu bone konas la lingvon, interesiĝas pri instruado, posedas Cseh-kurslibron aŭ jam praktikas la metodon.

La necesa materialo estas havebla surloke aŭ antaŭmendebla ĉe : Esperanto-Domo, Libro Servo, B. P. 74, 49150 Baugé.


:-:-:-:-:-:-:

Kultura Centro Esperantista
Postiers 27
CH - 2301 La Chaux de Fonds

K. C. E., en Svislando, estas alia grava parto de Esperantujo kie ĉiuj povas samtempe ferii kaj studi en vizitinda regiono.

2-4 aprilo :- La montaro Ĵuraso ekprintempe - gvidos C. Gacond
4-9 aprilo :- Intensiva pretiĝo al trapaso de Eto ekzamenoj
- Ĉu eblas societo sen leĝoj ? -instruos F. Degoul
21-23 majo - 2a studa semajnfino pri arbaro - gvidas J.Pachter

# 80a Franca Kongreso de Esperanto en Rouen



revue française d'espéranto

POR RICEVI PLIAJN INFORMOJN KAJ ALIĜI, VI BONVOLU SKRIBI AŬ TELEFONI AL "UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO" 4 BIS RUE DE LA CERISAIE. 75004 PARIS. TEL.: (1) 42.78.68.86 U.F.E. C.C.P. : PARIS N° 855.35.D.

ALIĜILO RESENDOTA KUN LA PAGO AL U . F . E .

## 80a Franca Kongreso de Esperanto en Rouen

**dum Pentekosto (de la 20a ĝis la 24a de majo 1988)**

Nomo : ______________________

Antaŭnomo : ______________________

Adreso strato : ______________________

urbo : ____________ poŝtkodo : ____________

Dato : ____________ Subskribo : ____________

| Kotizoj ĝis la | 31/12/1987 | | Poste | |
|---|---|---|---|---|
| | membroj | nemembroj | membroj | nemembroj |
| Kongresan(in)o | 180 F | 200 F | 195 F | 215 F |
| Geedzoj | 295 F | 305 F | 310 F | 320F |
| junuloj (ĝis 18a jaro) kaj studentoj | 110 F | 130 F | 120 F | 140 F |
| eksterlandanoj | senpage | | senpage | |

# Premier rendez-vous normand de l'espéranto

# 12-13 MARS

la langue inter·peuples

Après l'implantation de ses rendez-vous
dans plusieurs villes de l'Europe:
Avignon, Barcelone, Turin, Rastatt,
Helsinki...
la société coopérative de LITERATURA FOIRO
propose aux Normands de vivre, eux aussi,
pendant un week end, la culture internationale.
Au programme: cours d'espéranto tous niveaux,
conférences par des professeurs venus de Suisse,
session facultative d'examen, soirée théâtre
et diverses excursions à la découverte de Rouen.



**cours pour débutants: samedi 16h00-18h45, dimanche 9h30-12h15**

Vendredon la 11an

16h00 urbovizito kaj ebla vizito en la ekspozicio pri C. Freinet
en la nacia edukmuzeo aŭ vizito en artgalerioj

19h00 krespomanĝo en gastejo (prezo: po 40 FF)

Sabaton la 12an

9h00 ekzamenoj de Franca Esperanto-Instituto (gradoj 1a, 2a, 3a)

10h00 urbovizito

14h00 ĝenerala asembleo de Societo Yvonne Martinot

16h00 studgrupoj

19h00 vespermanĝo en memserva restoracio (prezo: po 35 FF)

20h30 Kio estas La Kvinpetalo? prezentas Suzanne Bourot
Skeĉoj de TESPA

Dimanĉon la 13an

9h30 studgrupoj

12h15 bufeda lunĉo en la rendevuejo (prezo: po 40 FF, anoncu vin aliĝile!)

14h30 vizito en muzeoj pri belartoj, antikvaĵoj, ceramiko, artferaĵoj...

Lundon la 14an

aŭtomobila ekskurso en la ĉirkaŭa regiono

STUDGRUPOJ: A - débutants; B - progresantoj; C - Silfer; D - Martinelli
Giorgio Silfer enkondukos al esperantologio;
Perla Ari Martinelli gvidos vin tra la humuro de Julio Baghy.

**rouen** 76100

maison des jeunes

kooperativo de literatura foiro

# BULLETIN D' INSCRIPTION

- L'inscription comprend les cours, la soirée théâtre et les visites en ville: I20 F (moins de 26 ans 80 F )
- Le dimanche midi nous vous proposons un buffet, règlement à l'inscription: 40 F
- Nous pouvons vous réserver une chambre pour le samedi I2, règlement sur place à l'hôtel: un lit: 75 F deux lits:I05 F
- Gejunuloj kunportu dormosakon, se ili deziras tranokti ĉe esperantisto.
- Se la anoncon pri la rendevuo vi legis en iu gazeto ne forgesu kunsendi la abonetikedon kun la nomo, tiel vi ĝuas 25% kotizrabaton.

---

NOM: PRENOM:

ADRESSE:

Année de naissance: Téléphone:

S'inscrit au cours d'initiation .............................. oui/non

Aliĝas al la studgrupo ...................................... B / C / D

Désire une chambre à l'hôtel pour le samedi I2 ............ I lit/2 lits

Mendas hotelĉambron unulitan/dulitan por la noktoj ........ jes/ne

Kiel junul(in)o, deziras tranokti ĉe esperantisto ......... jes/ne

Mia pago/ mon règlement:

| | |
|---|---|
| inscription/aliĝo .......... | FF |
| buffet/bufedo .............. | FF |
| TOTALO ..................... | FF |

Envoyez ce bulletin d'inscription avec le règlement correspondant à:
ROUEN-ESPERANTO, 43 rue Desseaux, F-76I00 ROUEN, Tel (+33) 35.727II7
(CCP 27 70 32 A Rouen)

---

Par retour du courrier vous allez recevoir une confirmation de notre part, accompagnée d'un plan de la ville et des instructions nécessaires pour rejoindre la maison des jeunes rive gauche. Si vous desirez des renseignements complémentaires ou si vous n'avez pas encore reçu de documentation complète sur l'espéranto, téléphonez à Maryse au 35.72.7I.I7

A BIENTOT ! ĜIS !